



Turlando
54
2a trimestro
2022
Luko

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place Gaston Pailhou
37000 Tours
esperanto-touraine37@wanadoo.fr
<https://esperanto-tours.legtux.org/>

Enhavtabelo	Paĝoj
Jean-Mary tradukis prezenton de Samuel Delziani pri la libro American Dirt, kiu rakontas pri ĉiuj malfacilaĵoj, kiujn devas alfronti la migrantoj el Sud- kaj Mezameriko por trairi Meksikon kaj fine atingi Usonon.	1 2 kaj 3
Jean-Mary ŝatas legi la novelojn aperantajn en la retejo short-edition.com kaj kiam novelo plaĉas al li, li tradukas ĝin. Mi ŝatis la novelon "Majstro" kaj esperantigis ĝin por vi. Mi esperas, ke ankaŭ vi ŝatos ĝin.	4 5 6 kaj 7
Jan Pierre kutimas raporti pri siaj piediradoj. Dum unu el ili li trafis la solan vitobienon klasitan historia monumento. Li priskribas ĝin kaj kaptas la okazon por rememorigi al ni vortprovizon pri vino kaj vito.	3 kaj 4
Madeleine malkaŝas sian recepton pri ĉarlotkuko. Ni varme dankas.	8

Romano

American Dirt, en la ventro de « la besto »

Per American Dirt, Jeanine Cummins liveras timigan rakonton pri la vojaĝo de patrino kaj ties filo interne de "La Besta"- la besto, kiel migrantoj moknomas la vartrajnojn, kiuj permesas transiri Meksikon kaj atingi la landlimon de Usono. Pugnofrapa romano, kiu ĵus estis publikigita poŝgrande en la kolekto 10/18.



Jeanine Cummins

Akapulko, banurbo en Meksiko. Lydia Quixano Pérez, 32 jara, tenas malgrandan librovendejon, dum ŝia edzo Sebastian, ĵurnalisto, raportas pri la plipotenciĝo de loka kartelo - Los Jardineros. Sekve de artikolo malkaŝanta la identecon de ĝia estro - kutima kliento de la librovendejo, kiu fariĝis proksima amiko de la juna virino, la familio estas masakrita de murdistoj je kartelsoldo okaze de festo. Lydia kaj ŝia okjara filo, Luca, estas la solaj postvivantoj. Sed en mortodanĝero : por iliaj kapoj la kartelestro anoncis prezon. Tiam komenciĝas senespera fuĝo por savi la vivon de la infano.

Neniu vojo estas sekura... Ili ne povas preni la aviadilon pro manko de dokumentoj pruvantaj la identecon de Luca, sur la vojoj sin sekvas multaj vojbaroj starigitaj de armitaj viroj. Narkotaĵkontrabandistoj, sed ankaŭ koruptaj policistoj same danĝeraj por la du fuĝantoj. La trajno restas. En foresto de pasaĝertrajnoj restas nur vartrajnoj. Migrantoj moknomis ilin « La Besta » - la besto - kie kandidatoj al ekzilo devenintaj de la tuta Mezameriko kaŝe vojaĝas kun la espero atingi « El Norte » - la nordon - kaj ĝian promeson de prospero kaj, ĉefe, sekureco.

Sed eniĝo en veturantan vartrajnon estas tute ne evidenta... precipe kun juna infano! La faro estas plej danĝera: « Eĉ se ŝi scius, post kiom da tempo alvenos la sekva trajno, Lydia ne povas imagi eniĝi en la Bestia nun, kiam ŝi vidis, kion fari. Ŝi pripensas, dum ŝi piediras—dek du kilometrojn ĝis Huehuetoca. unue puŝi Luca sur la ŝtupareton? Kompreneble: kiel ŝi povus salti kaj lasi lin sur la grundo apud la trajno sen si? Ĉu ŝi sukcesus kuri kaj grimpi kun Luca ligita al ŝia kolo, liajn krurojn firme ligitajn ĉirkaŭ ŝia talio? Tio ŝajnas fizike neebla. Ĉiufoje, kiam ŝi provas bildigi al si la scenon, la fantasma finiĝas same. Buĉado. »

De vartrajno al vartrajno, ili plenumas vojaĝon en senkompata mondo. En ĉi tiu longa vojaĝo, ili alfrontas ĉiajn danĝerojn. Kompreneble, ekzistas solidareco, kiel ĉi tiu pastro, kiu provizas ĉambron kaj manĝon aŭ ĉi tiu viro, kiu kun maĉeto malkaŝe metita sur la ŝultron eskortas ilin al Gvadalaĥaro por malhelpi, ke ili ne estu agresataj.

Sed, la ŝancoj eliri sen damaĝoj estas tre malgrandaj: «La malsamaj manieroj morti sur «La Bestia» estas pli teruraj la unuj ol la aliaj : vi povas esti dispremita inter du vagonoj, kiam la trajno prenas kurbon. Vi povas endormiĝi, defali de la tegmento, esti entirita sub la radojn, havi la krurojn detranĉitajn »

Estas ankaŭ la perforto de la sekurecaj taĉmentoj, tiuj de la vojbarantoj, armitaj bandoj kaj drogkomercistoj: « oni povas morti batita, pikita,

krom se oni estas mortpafita. Ŝtelo estas evidente antaŭvidota. Forraboj por elaĉetomono oftas. Forrabintoj ofte torturas siajn viktimojn por pli bone persvadi la familion pagi. En trajnoj, uniformoj malofte reprezentas, kion ili devus reprezenti. Duono de la homoj, kiuj pretendas sin migrantoj, «kojotoj», inĝenieroj de la fervojoj, aŭ



membroj de la "migra" laboras por la kartelo.»

Dum la itinero, Lydia kaj ŝia filo renkontiĝas kun Rebecca kaj Soledad, du fratinoj adoleskaj knabinoj, kiuj devis forkuri de sia vilaĝo de Honduro por eskapi el la perforto de loka bandestro. Ĉiuj kvar konsistigas novan «familion» starigantan solidarecon inter ili, dum la vojo estas senkompata... La aŭtorino faris gravajn serĉojn por nutri sian rakonton, ŝi provizas cetere tutlonge de la libro realajn statistikojn pri la malsekureco, kiu regas en centra Ameriko kaj pri la malfacilaĵoj renkontitaj de la kandidatoj por la usona revo. Dum kvar jaroj, ŝi renkontis la agantojn de tiu ĉi socia dramo per la vizito de la du flankoj de la landlimo. Trans la vortoj, Jeanine Cummins sukcesis konservi veran empaton por siaj personoj.

La eldono de la libro - grandega sukceso trans Atlantiko - estis akompanata de furioza polemiko pri la supozita «kultura alproprigo» far la aŭtorino

de la kaŭzo de la enmigrintoj. Jeannine Cummins, kiu estas nek latino nek migrantino, ne havus la rajton por uzi la temon. Proceso pro «aŭtenteco», kiu neas la tutan belecon de la arta kreado. Esti verkisto, ĉu ne estas fine havi la kapablon meti sin en la haŭton de alia? Kritikistoj ankaŭ pridubis la priskribon de la Meksika realo kaj kelkajn malprecizaĵojn. Tamen la romano avida legiĝas! La verkisto Stephen King avertas : «Mi defias iun ajn legi la unuajn sep paĝojn de ĉi tiu libro kaj ne iri ĝis

la fino»

Tiun resumon verkis Samuel DELZIANI kaj esperantigis Jean-Mary

American DIRT de Jeanine Cummins, el la angla tradukis Françoise Adelstain kaj Christine Auché. Collection 10-18.

La Vie du Rail la 18an de februaro 2022

La vinbereco inter la muroj

En Maine et Loire ekzistas unika parcelo en la mondo.

Tiu ĉi sperto de vinberkultura plantado naskiĝis el la imago d'Antoine Cristal. Li riĉiĝis per la teksa industrio, revendis siajn ŝpinejojn favore al La Redoute kaj li revenis en sian naskiĝlokon. En 1890 S-ro Cristal aĉetas la kastelon de Parnay, poste li sin dediĉas al sia pasio por la vino.

En la jaro 1884 li kreis tiun vinberefion. Ĝi estas originala konceptado, ĉar krom muroj ĉirkaŭantaj la parcelon, dek unu aliaj muroj (el kalka ŝtono, la loka ŝtono) estis konstruitaj ĉiujn du vicojn da vitoj, orientitaj norde-suden. La vitotrunkoj estas plantitaj nordflanke, kreskas tra la muroj per truoj fositaj ĉirkaŭ kvindek centimetrojn for de la tero kaj disigas siajn vitobranĉojn sur la suda flanko. Tiel, la vito havas la piedojn malvarmetaj kaj la korpon por profiti de suno kaj varmego de ŝtono.

Priplantite per Chenin (bonega vinberspeco de Luarvinoj) ĉi tiu grundo havigas al la blanka vino fortan karakteron. Ĝi havas noblan bukedon, estas densa en la buŝo kaj donas bonegan esprimon de sia grundo (regiono de Saumur).

Ĉi tiu ĉarma loko, instalita sur suna monteto super Luaro, estas la sola vitobieno klasita historia monumento.

Oni subite malkovras kun miro murojn ĉirkaŭbarantajn terparcelon ĉirkaŭitan de grandaj etendaĵoj de vinberefioj kaj situantan sur la vojo de la granda migrado 3.

Kia surpriza haltejo estas tiu malgranda terpeco, kies ĉarmo ebriigas nin !

VITISTA FAKVORTARETO

Un cep : vinbertrunko, vinberplanto, rebo.

Un cépage : vinberspeco

Un sarment : sarmento, reboligno.

Un pampre : vinberbranĉo

Des grains de raisin : vinberoj.

Une grappe de raisin : vinberaro, traŭbo.

Une rafle : senbera grapolo.

Du jus de raisin : traŭbosuko.

Un cru : vingrundo, vitrikolto.

Une treille : vinberlaŭbo.



La vigne : la vito, vinberujo.
 Une vigne : vitkampo.
 Un vigneron : vitrikoltisto, vitisto.
 Un vignoble : vitejo, vinberejo, vitobieno.
 La viticulture : vitkulturado.
 Viticole : vitkultura.
 La vendange : vinberrikolto.
 La lie : vinofeĉo.
 La hotte : dorsokorbo.
 Le cellier, le chai : la vinejo.
 Un pressoir : vinberpremilo.
 Une cuve : tino, kuvo.
 Une fosse (cimentée) : kuvego.
 Un tonneau : barelo.
 Un baril : bareleto.
 Un cerceau : barelbando.
 Tirer au tonneau : elbareligi.
 Un tonnelier : barelisto, tinisto.
 Un sommelier : vinisto.
 Une cuvée de .. : timpleno da, kuvpleno da...
 Une bonne cuvée : bona kuvpleno.
 Le mildiou : la vitŝimo, la melduo.
 Un vin doux : dolĉa vino.
 Un vin moelleux : mezdolĉa vino
 Un vin fruité : fruktogusta vino
 Un vin tannique : taninoenhava vino
 Un vin sec : seka vino.
 Un vin demi-sec : duonseka vino.
 Un vin effervescent : eferveska vino.
 Un vin mousseux : ŝaŭmvino.
 Un vin pétillant : ŝaŭmkraketa vino.
 Un vin tranquille : kvietta vino.
 Un champagne : ĉampano.
 Gouleyant : facilgluta, glutagrabla, gorĝkaresa.
 Tailler la vigne : eltranĉi sarmentojn.
 Coller un vin : klarigi vinon.
 Tire-bouchon : korktirilo.



Tiun interesan dokumenton verkis Jan Pierre

MAJSTRO

far Robert Grinadeck

Ĉar mi neniam interesis la aliajn, mi mem fine ne plu sentis ian intereson al ili.

Antaŭe mi estis pianisto-akompanisto. Obskura metio, kiu ne havas la prestiĝon de tiu de pianisto-solisto. Tamen ĝi estas postulema arto, kiu necesigas senmankan teknikon, akran sentemon kaj ekstreman modestecon. Endas valorigi la kantiston, al kiu vi estas en servado. La stelulo ne estas vi. Sed sen vi la stelulo estas nuda. Mi akompanis la geplejgrandulojn, sur la plej famaj scenejoj en la mondo, en la preskaŭ tuta repertuaro, germana, franca kaj itala. Poste novaj generacioj iom post iom anstataŭis tiujn, kiujn mi estis servinta. Oni dungis min malpli kaj malpli. Fine, pro la aĝo, la turneoj, kiuj necesigis longajn vojaĝojn, iĝis penigaj al mi. Tiel post kelkaj jaroj oni forgesis min. Dumtempe mi vivis per mia nura ŝparaĵo. Sed mi rapide ekkomprenis, ke mi elĉerpos ĝin antaŭ mia

vivofino. Tial mi provis trovi laboron, en kiu mi estos kompetenta. Mi longe serĉadis : kiam vi malaperis el tiu profesia medio, estas malfacilege reveni en ĝin. Kaj la aĝo estas kroma malhelpo. Ĉar necesis, ke mi gajnas mian vivtenon, mi akceptis sen plua espero tiun postenon de pianisto en sensignifa dancateliero. Mia laboro estas nur ludi, en la kadenco elektita de la instruisto, kelkajn simplegajn akordojn, aŭ permitajn aŭ per arpeĝoj realigitajn, sur kiuj mi foje improvizas nepersonan melodion. Estas diskoj, kiuj bonege faras tion, sed la kursestrino, fraŭlino Sannoy, eksa unua dancistino en duaranga baletto, vologas, pro la prestiĝo de sia lernejo, laborigi muzikiston kun karno kaj ostoj, «majstron», kiel ŝi nomas lin.

De lundo ĝis vendredo, de la dekseka ĝis la dudek dua, kaj merkrede ekde la deka, mi nevidebla aŭdigas miajn notojn per vertikala piano, kiun necesus agordigi, dum lernantoj kun malsamaj aĝoj laŭ la horo strebas per arabeskoj, supren- kaj revenkrurmovo kaj ankaŭ ĵetsaltoj, sub la raŭkaj ordonoj de fraŭlino Sannoy. Neniam alparolas al mi unu el ili, kvazaŭ mi formus kun la piano koheran tutaĵon el karno kaj ligno : mi estas instrumentoparto, kiu movigas la alian parton. Tia estas la supera formo de malrespekto, kiu celas min.

Do vi pravus pensi, ke mi sentas nur grandan seninteresiĝon al ĉiuj tiuj knabinoj aŭ virinoj, malaltaj aŭ altaj, belaj aŭ malbelaj, graciaj aŭ malgraciaj, malmulte dotitaj koncerne la plejmulton el ili, kiuj moviĝas post mia dorso sub la aŭtoritato de la Sannoy!

— Nu, fraŭlinoj, oni rekomencu... Majstro, mi petas... Kaj-unu-kaj-du, streĉita-estu-la-kruro!

Krom tiuj cirkonstancas eldiroj ankaŭ ŝi neniam diras al mi vorton, nur bonan tagon – bonan vesperon, almenaŭ kiam ŝi pensas pri tio. Monatin fine mi trovas mian ĉekon sur angulo de ŝia skribotablo, en koverta portanta mian nomon. La sumo estas iom pli alta fine de decembro, kun multkolora karto portanta mesaĝon en tiu nura printita formulo : «Ĝojajn festojn kaj bonan jaron», ĉiam la samon, tio verŝajne estis sortimento.



la

Mi ne klare memoras la momenton, kiam ŝi ekvizitis la kurson. Sendube mi diris al mi, ke ŝi estas iom malsama ol la aliaj : beleta por rigardi, sed tamen ne taŭga por fariĝi dancistino. Kaj ŝi transpasis la aĝon : kvardek, kvardek kvinjara. Malrapidema, ĉiam la lasta por finrevesti sin kaj forlasi la muzikatelieron.

— Bonan vesperon Fraŭlino Sannoy !

— Bonan vesperon Mathilde !

Kaj la pordo klakfermiĝis sen vorto al mi. Tute kiel kutime.

Mi aŭdis ŝin zumkanti : tio estis lido eltirita el la vintra vojaĝo de Schubert. Mi estis forlasonta mian pianon, sed atentigis min ŝia mezosopranulina sonkoloro, kiu ĉiam estis laŭ mi la plej emocia. La voĉo estis evidente prilaborita. Kompreneble ! Kiu kantus Schubert ne preninte lecionojn ? Estis kvazaŭ io en mi vekiĝis. Eĉ antaŭ ol mi decidis pri tio, miaj manoj surklavariĝis kaj ekludis la akompanaĵon, pri kiu miaj fingroj senprokraste rememoris. Ŝi tuj haltis. Daŭrigis mi. En la sekvanta strofo ŝi plenvoĉe rekantis, kaj ĉifoje kun la vortoj. Ŝia kantado kaj miaj notoj unuiĝis en akordiĝon tute fluidan kaj energian. Min kaptis ĝojego, kiun mi ne plu sentis de longe, kaj mi aŭdis en ŝia voĉo, ke tio estas dividita. La Sannoy estis foririnta. Ŝi estis lasinta la ŝlosilojn sur la piano, kio signifis :

—Vi fermu elirinte !

Fine de la lido mi atendis, ke ŝi venos al mi por interŝanĝi kelkajn vortojn pri nia muzikaĵo. Anstataŭ tio, post momento da promesplena silento, la enirpordo klafermiĝis : ŝi estis foririnta ne dirante al mi eĉ unu vorton.

La unuan fojon de longe mi sentis la vundon kaŭzitan de tia malestimo. Kion mi faris por meriti tion ? Ke oni ignoras min en la rutina ekzerco, kiun mi plenumas por dancigi laŭritme sentalentajn knabinojn kaj ulinojn, tio estis tute indiferenta por mi. Sed ke estis montrita al mi la sama indiferenteco, kiam mi esprimis tiel intiman kaj puran senton, kaj plie de la persono kun kiu mi dividis ĝin, tio suferigis min trans



la elteneblo. Tiam mi iom pli enprofundiĝis, se tio eblis, en mian mizantropcon, kaj precipe en mian mizoginecon. Mi frapegis la kompatindan pianon ĝis mistraktado. Mi igis klaki prefere ol soni la agordojn. Mi trumpetis la melodiojn anstataŭ ol lasi ilin flui. Neniu verŝajne rimarkis la ŝanĝiĝon. El tio mi konkludis sen pli da amareco, ke, kion oni atendis de mi, tio estis fakte brui laŭ al mi trudita ritmo.

Oni ne revidis ŝin dum pluraj monatoj. Mi konfesas, ke ŝia ĉeesto estus min malsaniginta. Pro honto aŭ tristeco, eble pro kolero, aŭ pro la tuto, mi ne vere scias. Poste, kun la tempo, la vundo fine cikatriĝis : nur necesis atenti, ke ĝi ne malcikatriĝu.

Ŝi reaperis iun vesperon. Ŝi lokis sin ĉe la stango, en sia malva brustovesto kaj sia nigra ŝtrumpokalsono, kun la haroj kunligitaj en hartubero kaj la dancoŝuoj malalte laĉitaj sur la maleoloj. Niaj rigardoj evitis sin reciproke, tamen mi ja sentis, ke malantaŭ mia dorso ŝi rigardadis min. Kiel ŝi kutimas, ŝi estis la lasta, kiu eliris el la vestejo.

— Bonan vesperon, Fraŭlino Sannoy !

— Bonan vesperon Mathilde !

— Bonan vesperon... Majstro !

Mi kredis, ke mi misaŭdis. Ĉu ŝi diris « majstro », aŭ ĉu estis trompo de mia imago ? Ĉu ankoraŭ restis iu en la muzikateliero krom Sannoy kaj mi ? Mi stariĝis por kontroli. Eble ŝia saluto direktiĝis al alia lernantino, kies nomosonoro estas proksima al mia kromnomo.

— Ĉu vi serĉas ion, Majstro ?

— Be... ne. Mi estis foriranta. Bonan vesperon, Fraŭlino Sannoy !

— Bonan vesperon, Majstro !

La tono estis sen nenia varmo, kiel kutime, sed mi vere fajfis pri tio. La malgranda kantistino Mathilde estis gratifikinta min per « bonan vesperon » laŭŝajne plena je timideco, kiel tiu, kiu trafas nin fronte al iu, kiun oni admiras. Evidentis, ke mi faris al mi falsajn ideojn. En la plej bona okazo ŝi ekkomprenis, ke ŝi grave kulpis la antaŭan fojon, kaj ŝi volis ripari, iniciato, kiu kaŭzis ĉe ŝi pli da ĝeno ol kvietigo.

La sezono finiĝis. Ŝi ne estis reaperinta. Dum kelkaj semajnoj mi estis konservinta la konfuzan esperon, ke ŝi revenos, sed tio ne kaŭzis al mi tro grandan zorgon. Mi denove refalis en mian kutiman indiferentecon. La lasta kurso estis finiĝinta. Mi hejmeniris kun la perspektivo de nova somero de soleco. La aero estis milda, varmeta, stampita de diskreta parfumo de lonicero, aŭ eble de siringo, mi neniam vere sciis la diferencon.

Mi ne tuj rekonis ŝin. Ŝi surhavis ampleksan jupon kaj ŝiaj haroj estis malaranĝitaj. Ŝi antaŭeniris al mi. Alveninte kelkajn metrojn for de mi, ŝi malplirapidiĝis, ŝajnis heziti, poste, retrovante sian unuan rapidecon, ŝi alparolis min, timida kaj tamen senhezita.

— Bonan vesperon... majstro Mi estas kontenta vidi vin ! Ĉu eblus paroli kun vi ?

La neatenditaĵo de tiu renkonto kaj precipe de tiu propono konsternis min. Antaŭ kiom da tempo oni montris al mi tian intereson ? Ŝi ridetis, sed mi kredis legi en ŝia rigardo la timon de rifuzo. Embarasite mi

respondis :

— Jes, se vi volas !

Ŝi invitis min trinki glason kaj ni instaligis sur la teraso de apuda trinkejo.

— Mi estas vere konfuzita pro... la alia fojo... ,kiam mi forlasis la muzikatelieron ne salutante vin.

Mi ne aŭdacis respondi al ŝi, ke ŝi profunde estis vundinta min. Mi restis muta.

— Via akompano... Vi emociegis min tiagrade, ke mi ekploregis post la lidfino. Tial mi foriris dirante nenion, mi opiniis min tiom stulta. Sed kedu min, mi plejaltgrade riproĉis min pri tiu malĝentilaĵo... al vi... ,kiu estis akompaninta min belegmaniere ! Mi ne aŭdacis reveni al la muzikateliero. Poste, iun tagon, mi kuraĝe decidiĝis reveni tien, necesis, ke mi riparu tiun kulpon, tiun mankon. Sed mi ne havis la kuraĝon alparoli vin pro mia tiom granda honto. Tiam mi limigis min per tiu lakona « bonan vesperon » kvankam mi konsciis pri ties nesufiĉo.

Mi restis muta, ege embarasita. Ŝi fikse rigardis min per iom malfermegitaj okuloj, evitema rigardo suben, kiel tiu de infano, kiu timas post malsaĝaĵo. Ŝi tenis siajn manojn kunigitaj inter la genuoj, siajn ŝultrojn altaj kaj kunstreĉitaj. Poste ŝi fine diris :

— Mi volis peti pardonon de vi, esperante, ke vi konsentos ĝin. Tio tre gravas al mi...

Mi iom rehavis mian konscion. Profunde emociata de ŝiaj diroj kaj ekkonsciante pri apero de rideto sur miaj lipoj, mi murmuris en elspiro :

— Kion vi volas, ke mi pardonu al vi ? Ne gravas...

— Ĉu vere ? Ho, dankon ! Dankon ! Mi timegis ofendi vin. Vi havas tiel belan sentemon, tion on sentas en via ludmaniero !

— Vi flatas min. Sed mi estas nur maljuna pianisto por muzikateliero...

— Ne, evidentas, ke vi estas multe pli ol tio.

Subite ŝi ruĝiĝis.

— Pardonu mian aŭdacon, ĉu vi akceptus, ke ni iĝos geamikoj ?

— Geamikoj ?

— Mi neniam renkontis iun, kun kiu mi dividis tian feliĉon muzikumi. Mi dezirus, ke tio plu daŭru. Mi vizitas kantokurson kaj mi havas pianon hejme, estus al mi eksterordinare kanti akompanata de vi !

Ondo de tenereco dronigis min, fluaĵo varma kaj sukerita de feliĉego.

— Sed... tio feliĉigus ankaŭ min !

Ofte dimanĉon aŭ festotagon ŝi invitas min por tagmanĝi. Poste ŝi kantas kaj mi akompanas ŝin. Mi malkovrigas al ŝi novajn repertuarojn, novajn muzikpecojn, kiuj miaopinie valorigos ŝian voĉon, kaj mi malofte eraras. Ŝi proponas ilin al sia instruanto, kiu laborigas ŝin pri ili. Ŝi prezentis lin al mi. Ĉarma viro kaj bonega pedagogo. Li konis min laŭnome. Komence li estis tre embarasata, sed kiam li vidis la artan komplacecon, kiu unuigis nin, Mathilde kaj min, lia antaŭtimo foriĝis. Kaj ni amikiĝis tiagrade, ke li petis de mi, ke mi akompanu liajn plej bonajn lernantojn por la jara koncerto de lia lernejo. En sia antaŭparolo li prezentis min al la publiko en laŭdega maniero, elvokante la karieron, kiun mi estis havinta. La spektantoj ŝajnis kontentaj, kaj multe aplaŭdis nin. Post la prezentado mi surpriziĝis, ĉar kvin aŭ ses personoj alparolis min. Ili estis homoj de mia generacio. Ili petis de mi aŭtografojn, dirante al mi kiom multe ili estis ravitaj kaj honoritaj per tio, ke ili vidis kaj aŭdis min tiuvespere, kaj rememorigante al mi kelkajn miajn pasinttempajn koncertojn, kiujn ili ĉeestis. Ĉar mi neniam interesis la aliajn, mi mem fine ne plu estis sentinta ian intereson al ili. Sed tio apartenas al la pasinteco.



Tiun novelon aperintan en "short-edition.com" esperantigis Jean-Mary

RECEPTO DE ĈARLOTKUKO

INGREDIENCOJ

200 g da kuleraj biskvitoj

3 supkuleroj da rumo

250 g da nigra ĉokokado

60 g da butero

3 ovoj + 1 ovoblanko

1 skatolo da siropaj piroj

Elgutigi la siropajn pirojn por rekuperi la siropon en bovlo. Tranĉi la pirojn en lamenetojn.

Tegi la internon de kukmuldilo per alumina papero. Lasi elstari eksteren. Trempi unuope biskvitojn en la siropon de piroj parfumitan per rumo kaj tegi per ili kun la konvekso flanko eksteren la ĉirkaŭparton de la kukmuldilo sen interspaceto tiel same kiel en la fundo de la kukmuldilo.

Forfluidigi la ĉokoladon per kuirbano kun iomete da akvo. For de la fajro, lasi ripozi dum 1 minuto kaj enigi la ovoflavojn en la ĉokoladon.

Miksi ovoblankojn kun 1 pinĉopreno da salo kaj enigi delikate per la spatelo por obteni leĝeran ŝaŭmaĵon.

Elverŝi la duonon de la ŝaŭmaĵo en la kukmuldilon. Aranĝi lamenetajn pirojn sur la ŝaŭmaĵo. Gardi kelkajn lamenetojn por ornamo la ĉarlotkukon. Elverŝi la ceteron de la ŝaŭmaĵo kaj glatigi. Kovri per sorbigitaj biskvitoj.

Mallevi la aluminian paperon sur la biskvitojn kaj meti en malvarman lokon dum 12 horoj.

Elmuldigi kaj regalu vin !

Tiun recepton proponis Madeleine.

